

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## Pri Ukrainio kaj nia deklaro

Je la 22a de marto 2022, kiam ni redaktas tiun ĉi numeron, ankoraŭ daŭras invado al Ukrainio fare de Rusia militoforto. Ni esperantistoj havas amikojn kaj en Rusio kaj en Ukrainio. Ni, jokohama-anoj havas fortan rilaton precipe kun samideanoj en Odeso, ĉar Odeso estas ĝemela urbo de Jokohamo. En la 5a de marto, ni lanĉis deklaron, kiel sube montrite.

## Deklaro

### Nia deklaro timante la situacion en Ukrainio

Ni, la anoj en NPO Esperanto Jokohama, alvokas kontraŭ la malhumana milita invado de Rusio al Ukrainio, same al la tutmondaj esperantistoj, inkluzive de la rusaj kaj ukrainaj.

La havenurbo Odeso en Ukrainio estas unu el la ĝemelaj urboj de Jokohamo. Kaj ni havas plurajn amikojn en Odeso. Ni tuj rete kontaktis ilin kaj daŭrigas interkomunikadon.

Ni deziras ke, ĉiuj pacdeziraj homoj en la mondo kunlabore ĉesigu tiun teruran militon de Rusio al Ukrainio, kaj helpu la popolanojn kiujn la milito vundis kaj suferigis.

La 6an de marto, 2022

Ne-Profitcela Organizo Esperanto Jokohama



esperantistoj sur Strato Puŝkin en Odeso, irantaj al la 200-jara jubileo de la urbiĝo de Odeso

Dua de dekstre estas s-ino Tamara Popova.

1994-09-02, foto liverita de Tanigawa Hiroshi

## pri la milito en Ukrainio

Doi Ĉieko

La urbestro de Jokohamo (s-ro JAMANAKA Takeharu), havis retan kontakton kun la urbestro de Odeso (s-ro Turchynov, Gennadi). Kvankam almenaŭ nun Odeso ne estas atakata, la odesa urbestro diris, ke nun Odeso estas sub la tragika situacio minacota, kaj dankas al la subteno de Jokohamo. La urbestro de Jokohamo diris, ke li timas la situacion de Odeso kaj volas fari laŭeblajn helpojn kaj subtenojn.

Post la interparolo, la urbestro de Jokohamo parolis al ĵurnalistoj, ke la urbo nun volas komenci kolektadon de subtena mono, kaj pozitive akcepti ankaŭ rifuĝintojn el Ukrainio. La reta interparolo okazis laŭ la iniciato de Odeso.

Nun oni lumigas lumon de la urbdomo de Jokohamo per la flava kaj blua koloroj: tio estas la simbola koloro de Ukrainio, per kio Jokohamo esprimas proteston kontraŭ atako de Rusio al Ukrainio.

Jokohamo kaj Odeso ekhavis ĝemelan rilaton de la jaro 1965, kaj ĝis nun loĝantoj de ambaŭ urboj faris reciprokajn vizitojn. Ankaŭ esperantistoj de ambaŭ urboj faris reciprokajn vizitojn ĝis nun du-foje, unu de la alia.

Nun Jokohamo kolektas monon por Ukrainio: omaĝi al la viktimoj pro la rusaj atakoj kaj

montri deziron al la paco. En la unua etaĝo de la urbdomo oni kolektas la monon.

La urbestro parolis ankaŭ ke la urbo estas preta akcepti rifuĝintojn el Ukrainio al Jokohamo.

Ankaŭ ni esperantistoj en Jokohamo deziras iel helpi vin, odesanoj.

Bonvolu informi nin pri via nuna vivo. Ni povos plu informi esperantistojn kaj ankaŭ ne-esperantistojn en Jokohamo pri via vivo. Ni atendas viajn skribaĵojn!



Virino en la centro estas s-ino Tamara Popova el Odeso, Ukrainio. Ĉe la UK en 2015 en Francio. Ŝi forpasis en 2021 pro kovimo 19. Maldekstre estas Doi Ĉieko.

## Jarkunveno 2022 plenumita

La Jarkunveno, nia plej supra decidorgano, de NPO Esperanto Jokohama okazis en la 27a de februaro, kaj jenaj aferoj estis aprobitaj.

1. La jarraporto por 2021 kaj la plano por 2022
2. La kasraporto por 2021 kaj la buĝeto por 2022
3. Ŝanĝo de unu el la du revizoroj: retiriĝis s-ro Tanigawa Hiroshi, kaj instaliĝis s-ino Murata Kazuyo. Restas la alia revizoro, s-ro Karibe Riiti.
4. Ŝanĝo de la oficiala sidejo de nia organizo: ĝise la adreso estis ĉe s-ro Doi Hirokaz, sed de nun la adreso de la Esperanto-Muzeo Jokohama validas.
5. Eksperimenta kotiz-rabato: nia baza membrototizo estas 6000 enoj jare, kun kelkaj rabatadoj. Ni enkondukas sistemon, ke handikapito estas rabatita je 3000 enoj.
6. La Regularo pri la administrado de Esperanto-Jokohama aprobita. (Sibayama Zyun'iti)

## EL NIA MUZEO

En la jarkunveno de NPO Esperanto Jokohama, la regularo pri la Esperanto-Muzeo Jokohama estis aprobita. Jene estas la ĉefaj aferoj en la regularo.

1. La Muzeo celas diskonigi Esperanton vaste al la publiko. Cetere, ĝi funkcias ankaŭ kiel nia oficejo.
2. La Muzeo estas administrata de la Administrantaro.
3. La Administrantaro konsistas el la Estro, Kasisto kaj pluraj Administrantoj. La Estro kaj la Kasisto estas nomumitaj de la Estraro, sed aliaj libere aliĝas.
4. La Muzeo povas havi Honorajn Konsilantojn el ekster la NPO.
5. Oferdonanto al la Muzeo povas esti traktata kiel Subtenanto de la Muzeo.